## Ĉu tio konkrete ekzistas?

Jes! Ekde 2017, la Ğ1 (prononcu Ĝuno) estas funkcianta libera mono, kun pli ol 6800 kunkreantoj (ĉefe franclingvaj, sed ankaŭ el Hispanio, Portugalio, Italio, ktp.).

Ĝi estas kriptomono, t.e. ĝi funkcias totale sencentre, dank'al Interreto. Ĝi estas demokratie regata: ĉiuj povas proponi ŝanĝon de la protokolo, tiam ĉu interkonsento estiĝas, ĉu branĉo aperas kun ties propraj reguloj. Neniu ligo kun registaro aŭ alia malfidinda organizo.

## La reto de fido

Por ke neniu amasigu multajn UDjn (tio estus malegaleco), necesas garantii, ke ĉiu viva homo ne havu pli ol unu konton. Por kunkreantiĝi, do krei siajn UDjn kaj parte regi la monon, sufiĉas ke pluraj kunkreantoj atestu vian ekziston kaj ke vi komprenis la implicojn. Por tio, veraj renkontiĝoj necesas: la Ğ1 estas sociala kaj bazita sur la homo!

## Kiel uzi ĝin?


Eĉ sen esti kunkreanto, vi povas uzi ĝin! Vendu, aĉetu, ricevu, donu...


Tio estas tre simpla kun cesium.app/eo/

Cesium

Fasonita per kontribuantoj, kiuj ne ŝatus retrovi ĉi tiun flugfolion disĵetitan sur la publikan spacon aŭ en la naturon.

Kreskado de la monmaso je 10%/jaro por ĉiu Universala Dividendo ebligas egalecon inter uloj kaj generacioj.







# Ğ1 June

Lerni pli: monnaie-libre.fr

# Libera mono

por reakiri la povon

kaj

rehomigi la ekonomion

*Kompreni la monon*

*Kio estas libera mono?*

*Kiel uzi ĝin?*

*Krei la alternativon*

Esperanto

## La ŝuldmono, origino de la malbono?

La Eŭro estas ŝuldmono: la banko kreas la monon "ex nihilo" (el nenio), kiam oni prunteprenas. Kiam oni repagas, la banko gardas la interezojn kaj nuligas la ceteron. Oni devas do pruntepreni pli por repagi la interezojn. Tio avantaĝas la bankon, kio kreas gravan malegalecon.

Tia kurado necesigas kapitalismon, troproduktadon kaj trokonsumon: oni devas senĉese produkti pli kaj pruntepreni pli por eviti ekonomian kolapson.



## La libera mono, ĉu solvo?

Libera mono estas spezperanto respektanta la 4 fundamentajn ekonomiajn liberecojn egale por ĉiu individuo:

- Libereco ELEKTI SIAN MONON
- Libereco UZI LA RESURSOJN
- Libereco PRODUKTI ĈIAN VARON
- Libereco INTERŜANĜI LA VAROJN


## Kiel tio funkcias?

Ne plu estas bankoj: la individuoj kreas senĉese kaj egalece Universalan Dividendon (UD). Ĉi tiu pliiĝas laŭtempe, tiel ke la estontaj generacioj ne malavantaĝiĝu rilate al la pasintaj. Oni do pli profitas interŝanĝante ol amasigante.

Ĉi tiu UD nature okazigas monan egalecon: sen interŝanĝi, ĉiu individuo konverĝas al la averaĝo, estante sub aŭ super ĝi. (vidu la grafikaĵon malantaŭe)

## Renkonti homojn

Lokaj grupoj aperas ie ĉie: Tuluzo, Parizo, Bordozo, Liono, Perpinjano, Belgio, Hispanio… Ili regule organizas renkontojn kun aperitivoj, bazaroj, ktp. Vi povas aliĝi aŭ krei novan grupon apud via loĝloko, libere!




## Kion mi povas fari per ĝi?

En Tuluzo, vi povas aĉeti interalie lumpiojn, bieron kaj ekologiajn legomojn. Aliaj vendas metiartaĵojn, muzikilojn, aŭ proponas kunveturadon, komputilan programadon… Jam miloj da anoncoj ĉe Ğchange, la bonangulo (Le Bon Coin) de la Ğ1!

mi interŝanĝas per gchange.fr

## Ĉu speco de baza enspezo?

La UD ne estas kalkulita por esti baza enspezo, ĉar ĝi estas kreado anstataŭ redisdonado. Tamen nenio nin malhelpas krei vivdaŭran salajron kaj socialajn helpojn aldone al la UD!

## Ekologia mono

Eĉ sen konsideri la investojn de bankoj rilate petrolon, banka spezo konsumas multe da energio. "Bitcoin" multege konsumas, ĉar pli da komputila potenco ebligas pli da povon por ties posedanto. Kontraŭe, la Ğ1 povas funkcii sen problemo per etaj komputiloj konsumantaj malmulte, dank'al sistemo senutiliganta la kuron al la povo. Tia mono do estas relative ekologia kaj rezistema.



Ĉu demandoj? Respondoj estas!

…aŭ diskutu kun kontribuantoj ĉe la forumo!



forum.monnaie-libre.fr/c/langues/esperanto/100

Publika havaĵo
Realigita per liberaj programoj
zettascript.org/tux/g1/flyer

Desegnoj: CC BY-SA Simon "Gee" Giraudot; Mapo: CC BY Stamen Design + CC BY-SA Kontribuantoj OpenStreetMap